

Kion faras Unesko ?

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-856/355, 1980 marto 06 kaj 08

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1980-54/SRI-1980-54-B-4-355-856-1980-03-06-08-Claude-kaj-Andree-Gacond-Kion-faras-Unesko.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni atentigis niajn aŭskultantojn pri la apero de informilo, kiun Unesko eldonis pri si mem, kaj citante el ĝi ni raportis kiel funkcias Unesko. Interalie ni menciis, ke la jarbuĝeto de la Organizo de Unuiĝinta Naciaro pri Edukado, Scienco kaj Kulturo superas cent milionojn da dolaroj. Multaj el niaj aŭskultantoj sin verŝajne demandis, kion povas fari Unesko kun tiu ĉi impona monsumo, tial ni hodiaŭ citas al vi, ĉiam el la prospekto kiun Unesko eldonis, erojn el la ĉapitro "Kion faras unesko", instigante vin, se vi ricevis la koncernan informilon, pli atente legi tiun ĉi dokumenton.

A.- Centoj da miloj da homoj vidas Uneskon tra tio, kion ĝi faras, Ili vidas ĝin diverse, laŭ sia loĝloko kaj laŭ sia vivmaniero. Ekzemple, al multaj afrikanoj Unesko signifas trejnadon de instruistoj, ĉar tio ĉi estas ĝia plej ampleksa agado kaj tiukampe estas nun efektivigataj ĉ. 30 projektoj en la afrika kontinento sole. Al sciencistoj Unesko povas aperi kiel la institucio, kiu starigis Eŭropan Organizon pri Nuklea Esplorado kaj ties grandan alterngradientan protonan sinkrotronon en Ĝenevo. aŭ kiel la aŭtoritato, kiu kunordigas la laborojn de Interregistara Oceanografia Komisiono, kies buĝeto estas pluraj miloj da dolaroj. En la mensoj de multaj aŭtoroj kaj eldonistoj Unesko estas la aŭspicia potenco de Universala Kopirajta Komisiono, kiu ekde 1952 garantias protektadon kaj ĉirkaŭmondan cirkuladon de la libroj signitaj per la simbolo ©, t.e. kopirajto.

Cl.- Kiam la delegitoj ĉe la Ĝenerala Konferenco de Unesko decidas la dujaran programon, ili konsideras ĝian agadon alimaniere. Zorgante pri vasta aro da projektoj havantaj po unu propra tuja teknika celo, ili tamen povas konsideri ilin kiel rimedon por plenumi pli vastajn celojn: instigi internacian intelektan kunlaboradon (samtempe ilo kaj celo de la tuta agado de Unesko), akceli evoluadon asistante efektive Ŝtatojn Membrojn kaj, sur morala kampo, iniciati favore al la paco, la homaj rajtoj kaj internacia interkompreno. Per tia laborado povas Unesko kontribui por krei la novan mondan ordon, kiun aspiras la tutmonda socio.

A.- Tamen, kio plej bone sugestas la rolon de Unesko en la nuna mondo, eble tio estas ties agado sur ĉiuj kampoj de sia kompetenteco. Ne aserteblas, ke la sekvantaj ekzemploj estas kompleta bildo de la amplekso kaj komplekso de ĝia laboro; ilia utilo estas nur ilustrati al kiaj laboroj Unesko dediĉas sin ĉiutage kaj al kio ĝi strebas. Ili estas aparte signifaj en la plej ampleksa parto de la agado de Unesko, nome: Edukado.

Cl.- Efektive, la edukado estis la ĉefprioritato en 1946, kiam Unesko naskiĝis kaj el la nova Organizo de Unuiĝintaj Nacioj kaj el la dummilite kreita Konferenco de Aliancaj Ministroj pri Edukado.

A.- Tiam ĝia tuja tasko estis doni unuan helpon: disdoni librojn kaj materialon por restarigi la eduksistemojn detruitajn de la milito kaj reestabli ligojn inter la kleruloj de la tuta mondo.

Cl.- Nun Unesko entreprenas pli vastajn agadojn. Ĉar la rajto je edukado estas nun agnoskita kiel homa rajto, la atingenda celo estas malfermi ĉie al ĉiu homa estaĵo aliron al la lernado. En

multaj landoj tio ĉi implicas krei lernejojn tie, kie neniuj jam ekzistas (tial Unesko konstante bezonas trejni instruistojn); aliloke la tasko estas reformi la edukadon, ĝiajn strukturojn, metodojn kaj enhavon por plidemokratiigi ĝin, ke ĝi estu avantaĝo por ĉiuj, ne privilegio por kelkaj.

A.- Dum la lasta kvarono de la dudeka jarcento fundamente ŝanĝiĝis la edukaj bezonoj plenumendaj de la Ŝtatoj Membroj kaj la rezultatoj atenditaj el la investoj.

Cl.- La edukadaj elspezoj de iuj evolulandoj povas egali kvaronon de iliaj naciaj buĝetoj. Kaj en ili kaj en la industriigitaj landoj la edukado estas esenca konsistigaĵo de la evoluiga procezo. La Ŝtatoj, kiuj strebas sekvi la rapidan teknologian evoluadon rigardas al siaj eduksistemoj kiel al fontoj de taŭgaj homoj kapablaj tuj fronti problemojn, kiam - aŭ eĉ antaŭ ol - ili ekstaras. La edukada programo de Unesko por la jaroj 1977-78 difinas la celon per jenaj vortoj: “ebliĝi al la edukado pli efike kontribui por solvi la nunajn problemojn de la homaro”.

A.- Kvankam necesas tiucele atenti la tutajon, la ŝanĝiĝo ne kaŭzis, ke la Organizo ĉesis agadi kiel en sia komenco. La unua efektiva Uneska projekto - en la Karaib-insuloj en 1946 - estis kampanji kontraŭ la analfabeteco. Nun, kiam evidentiĝis, ke nur ĝenerala mobilizado por nacia agado sukcesos venki tiun plagon, la alfabetizo ankoraŭ estas, kaj devas resti prioritata ĉe Unesko.

Cl.- Same pri alia problemo, kies deveno troviĝas ekster la kompetenteco de Unesko: jam de 1950 kunlaboradas Unesko kun Agentejo de Unuiĝintaj Nacioj pri Helpado kaj Laboroj por doni instruadon al la infanoj de la palestinaj rifuĝintoj. Komence de 1977 la nombro da tiucelaj lernejoj estis 600 kaj da lernejanaj ne malpli ol 300 000.

A.- Unesko kontribuas ankaŭ teknikan kaj profesian trejnadon ĉiujare por 4000 el tiuj lernantoj kaj aranĝas, ke ĉiusomere 6000 ĝis 7000 de la Gaza-strio trapasu enir-ekzamenojn de egiptaj universitatoj.

Cl.- Tiu ĉi jam malnova agado ilustras du aspektojn de tio, kion Unesko faras sur la eduka kaj aliaj specialigitaj terenoj. La alfabetizado dependas de naciaj klopodoj, kiujn Unesko povas partopreni. La zorgoj al la rifuĝintoj necesigas pro specifeco internacian agadon: tiam la Membroj povas helpi la Organizon.

A.- Plej ofte ambaŭ agadoj interekvilibras; dum la mondo ŝajnas malgrandiĝi kaj la problemoj grandiĝas, oni pli kaj pli tendencas al regiona kunlaboro, kies katalizilo estas ofte Unesko.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond legis al vi erojn el la prospekto, kiun Unesko eldonis pri si mem. Ĝis reaŭdo!